# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago №4 Aprilo, 2010

Kara Leganto! Jam pasis Paskaj festoj, kiun ĉi jare samtempe festis kredantoj de multaj eklezioj. Imponan prelegon donacis al ni s-ro A. Kolganov (vd. sube), li pretas denove prelegi julie. Interesan informon sendis ankaŭ d-ro Kordylewski pri poemo de S. Reddy (denove – vd. sube). Kvankam la redakcio strebas ne uzi la anglan, sed ĉi kaze ni faris escepton. Ankoraŭ unu "malagrabla" novaĵo – povas esti, ke ni kunvenos aprile en apuda restoracio (ve, sed biblioteko ne disponigis al ni salonon), sed, ĉu tio estos malagrable?

PS Lastmomente ni eksciis pri la terura tragedio koncerne la Pola Registaro. Denome de nia E-societo kondolencoj jam estis senditaj al la Pola Konsulejo.

–La Redakcio

## Skribsistemoj de la Uzbeka



*Samarkando - lulilo de la Uzbeka*

La uzbeka apartenas al tjurka familio de lingvoj, same kiel kazaĥa, turkmena, tatara, jakuta kaj aliaj. Dum pasinta jarcento ĝi havis kvar skribsistemojn – araban, latinan, cirilan kaj denove – latinan. Tiom ofta ŝanĝo de alfabetoj tendencas malfavore influi la kulturfonon de popolo ĉar ĉiu-foje perdiĝas akumulitaj scioheredaĵoj. Araba skribsistemo ne tre bone taŭgis por la uzbeka pro la malfacileco skribi vokalojn. Post kiam Uzbekistano fariĝis parto de Sovetunio, oni enkondukis la latinan skribmanieron, verŝajne uzante turkan lingvon kiel ekzemplo. Krom la uzbeka, kelkaj aliaj lingvoj transiris al la latina. Sed post dek jaroj la latina estis anstataŭigita per la cirila, kiu estis uzata dum kelkdek jaroj antaŭ la disfalo de Sovetio en 1990-aj jaroj. En tiu tempo kelkaj nove sendependaj respublikoj, inkluzive de Uzbekio, celis plie apartiĝi de la iama metropolo Rusio kaj kiel metodo ekprojektis forĵeti la cirilan alfabeton. Estis starigita la demando – kiun sistemon ekuzi por la uzbeka. En tiuj jaroj komputiloj ekludis gravan rolon, sed tiutempe ili ne funkciis tre bone kun ne-latinaj skribadoj. Do la araba alfabeto ne havis ŝancon. Oni decidis ekuzi la latinan, sed malsaman tipon ol antaŭ kelkdek jarojn, ĉar la tiama varianto dependis multe de la apostrofaj signoj. La nove ellaborita sistemo havis nur 26 standartajn leterojn kaj por la aldonaj sonoj oni uzu leterkunmetaĵojn (ekz. "sh", "ng") aŭ apostrofon. Uzbekistana registaro unue planis kvin aŭ dek jarojn por la kompleta transiro al la nova sistemo. Sed post fino de tiu periodo evidentiĝis, ke pli da tempo estas bezonata. Homoj daŭre uzas du sistemojn interŝanĝe. Estas nur minimuma kvanto da novaj libroj eldonitaj en la latina, do studentoj konstante revenas al la literaturo aperinta ĝis la ŝanĝo de skribsitemo. Eĉ sonas voĉoj por reveno al la cirila alfabeto denove.



*–Andreo Kolganov*

## ILo – en la Angla Poezio

Komence de 2010 nia vic-prezidanto d-ro L. Kordylewski sendis al la redakcio retejon kun la poemo de s-ro Srikanth Reddy – docento de la angla lingvo en la Universitato de Ŝikago. Nu tuj kontaktis lin kaj evidentiĝis, ke "bedaŭrinde, mi mem ne parolas E-on, mi nur simple estis sorĉigita per la fakto de la lingva multjara ekzisto. Ĝi estis miriga entrepreno, kaj

mi deziras al vi sukcese subteni vivantan la fajron de E-o por la estontaj parolantoj!..” Jen estas lia angla poemo:

As we speak, Esperanto is being corrupted
by upset languages such as Interlingua,
Klingon, Java & various cryptophasic tongues.
Our only hope of reversing this trend is to write
the Esperanto epic. Through its grandeur
& homegrown humility, it will spur men
to freeze the mutating patios so the children
of our children’s children may dwell in this song
& find comfort in its true texture & frame.
It’s worth a try. As I imagine it, it ends
in the middle of things. Every line of the work
is a first & a last line & this is the spring
of its action. Of course, there’s a journey
& inside that journey, an implicit voyage
through the underworld. There’s a bridge
made of boats; a carp stuffed with flowers;
a comic dispute among sweetmeat vendors;
a digression on shadows; men clapping
in fields to scare away crows; an unending list
of warships: The Unternehmen, The Impresa,
The Muyarchi, Viec Lam, The Przedsiebiorstwo,
The Indarka, The Enterprise, L’Entreprise,
Entrepeno... One could go on. But by now,
all the characters have turned into swallows
& bank as one flock in the sky-that is,
all except one. That’s how we finally learn
who the hero was all along. Weary & old,
he sits on a rock & watches his friends
fly by one by one out of the song,
then turns back to the journey they all began
long ago, keeping the river to his right.

## La Muzeo de l’ Ludoj parolas Esperante

musée suisse du jeu
schweizerisches spielmuseum
swiss museum of games

***http://www.museeduj.eu.com***

La Muzeo de l’ Ludoj, situanta en mezepoka svisa kastelo, konservas ĉarmajn ekzemplerojn de ludoj antikvaj kaj modernaj el diversaj landoj (Barato, Afriko, Ĉinio, ktp). La Muzeo aldonis IL-on al la elekteblaj lingvoj por vizitoj kaj laborgrupoj. Bonvenon: vizito daŭras ĉ. 1 horo. La muzeo troviĝas ĉe la bordo de la lago Lemano en la urbeto La Tour-De-Peilz, proksime al Lozano.

## El Nia Leterkesto

Nome de la Brita Biblioteko (BB) mi sincere dankas vin pri la valora donaco al la libraro. La donaco pliriĉigos la kreskantan E-kolekton de la BB kaj utiligos al multaj esploristoj, verkistoj kaj tradukistoj, kiuj studas la verkaron de E. A. Poe kaj tradukojn de liaj verkoj en diversajn lingvojn.

*–Olga Kerziouk, kuratoro de E-kolekto de BB*

## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O’Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – D-ro Les Kordylewski
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

## KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library**
**4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL**
**Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.**

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

27an de Aprilo – “Slava paganismo” (V. Pajuk)
18an de Majo – komputila E-ludo (R. Ekstrom)
27an de Junio – tradicia pikniko
27an de Julio – Andreo Kolganov klarigos pri “Utilkompanioj de Usono: Akvo, Elektro, Gaso”
24an de Aŭgusto – kunsido dediĉata al UK en Havano